



VILANOVA I GELTRÚ : *Muzeo-Biblioteko Balaguer*. — Rimarkinda konstruaĵo konservanta la nomon de sia fondinto, fama verkisto kaj historiisto. Ĝi posedas ĉirkaŭ 40 mil volumojn, kaj en la Muzeo, krom numismatika kolekto da 7 mil moneroj, troviĝas 5 mil diversaj objektoj : pentraĵoj, statuoj, juveloj, armiloj, k. t. p.

## VI KONGRESO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

VILANOVA I GELTRÚ  
16-17-18 OKTOBRO 1915



VILANOVA I GELTRŪ : *Placo de Konstitucio*; monumento de *filantropo Tomás Ventosa*. — En la placo de Konstitucio staras Urbodomo kaj Industria Lernejo. Vilanova estas urbo industrie tre grava, kie la efiko de industria lernejo estas tre necesa; ĝin ĉeestas multaj aliurbanaj, akirontaj la titolojn liveratajn de tia oficiala institucio



VILANOVA I GELTRŪ : *Parko Samà*. — Nia nunjara kongresurbo, loĝata de ĉirkaŭ 15 mil personoj, bezonas trankvilan lokon por promenadoj, agrablajn ludejon por infanoj : tia estas la urba ĝardeno «Parko Samà», apud kiu staras la Gimnazio de la «Plaj Skotanoj»



VILANOVA I GELTRÚ : *Marbordo*. — La nekruita marbordo, kie fiŝkaptistoj per siaj kutimoj kaj vivado prezentas allogajn scenojn, estas tre vizitata somere pro la agrabla banmaniero, kiun ĝi ebligas. Kaŭze de tio, apud ĝi oni starigis belan promenejon kaj kvartalon kun luksaj vilaoj, kiuj plimultiĝas kun ĉiu jaro



VILANOVA I GELTRÚ : *Aleo «Rambla Principal»*. — Tiu aleo ricevas nomon «Principal» (ĉefa), tial ke ĝi estas la plej centra kaj trairata el la urbaj promenejoj. Ĝi estas tre longa, kaj en ĝi staras teatro, kazino kaj diversaj kafejoj



VILANOVA I GELTRÚ : *Rokaro apud la maro.* — La urbo, kiu kuŝas sur ebenaĵo, etendas sian randon ĝis la maro, kiu faras tie sablan malkrutan bordon: ambaŭflanke, kvazaŭ la urbo estus akrita boato, ĝin protektas kiel haveno, abrupta rokaro, kiun la maro karesas per bela ŝaŭmo



VILANOVA I GELTRÚ : *Paroĉa preĝejo Sant' Antoni.* — De renesanca stilo, moderna, la paroĉa preĝejo estas kvankam arĥeologie ne interesa, tre bela. Preĝejo de la Geltrú, pli antikva estas ankaŭ vizitinda. Ankaŭ aliajn interesajn prezentas la kongresurbo de nia Sesa, kiujn niaj kunfederacioj havos la eblon persone ĝui